

»iv« estas adjektiva finaĵo inkludita en verbo. Pli bone estus listi »inkludi« kiel verban radikon kaj derivi el ĝi la adjektivojn »inkluda« kaj »inkludiva«. La sama principo aplikiĝas al »eksluziva«, sed en ĉi tiu kazo mi preferas la vorton »eskludi« jam uzitan de D-ro Andre Albault. Iu sugestis »enkludi« kaj »elkludi«, sed tiujn mi ne povas aprobi, ĉar ili inkludas la pure Esperantajn prefiksojn »en« kaj »el«, kiuj donas la impreson, ke »kludi« estas Esperanta verbo. Pro la sama motivo mi preferas »televizo« kompare kun »televido« kaj »televizio«.

»Administracio« estas pura kiam uzata en sia substantiva formo, sed la verbo »administracii« estas nepura, ĉar ĝi enhavas substantivan finaĵon en verbo. La sama principo aplikiĝas al »navigacio«. Pli bone listi la verbojn »administri« kaj »navigi«, el kiuj ni povas formi la aliajn derivaĵojn.

»Dumpingo« estas nepura, ĉar la substantivo enhavas anglan partecipian finaĵon. S. T. T. (9) prave listas »dumpi«, el kiu ni povas derivi la aliajn vortojn. Aliaj ekzemploj estas »kondolenci« (kondoli) kaj »apelacii« (apeli), sed John Warden (10) jam sufiĉe preparolis tiujn.

#### Konkludo.

Konklude mi sugestas, ke la devo de la Akademio estu ne nur gardi la netuŝeblecon de la Fundamento kaj doni ĝian oficialan aprobon por la enkonduko de novaj radikoj, sed konstante gvidi la evoluon de nia lingvo inter la limoj de ĝia esenca naturo, por ke ĝi ne senorde kreskadu aŭ kaose ŝanĝiĝu, kiel faras tiel facile kaj konstante la naciaj lingvoj, kaj aprobi nur tiujn aldonojn kaj modifojn, kiuj konformas kaj al la Fundamento kaj al tiu esenca naturo. Precipe mi deziras, ke ĝi faru oficialan anoncon pri vortkaraktero.

#### Bibliografio:

- (1) »La Senpera Verbigo de Adjektivoj« de H. A. de Hoog,
- (2) »La Logika Konstruo de Vortoj en Esperanto« de Rene de Saussure,
- (3) »La Fundamentaj Reguloj de la Vort-Teorio« de Rene de Saussure,
- (4) »La Gramatika Karaktero de la Esperantaj Radikoj« de Kolomano Kalocsay,
- (5) »Pri la Vortfarado en Esperanto« de J. R. G. Isbrucker,
- (6) »Lingvo Stilo Formo« (Esperanta Vortfarado), de Kolomano Kalocsay
- (7) »Lingvo kaj Vivo« de Gaston Waringhien,
- (8) »Plena Gramatiko« de Kalocsay kaj Waringhien,
- (9) »Scienca kaj Teknika Terminaro« de Haferkorn, Dellian, kaj Belinfante,
- (10) »The Edinburgh Esperanto Pocket Dictionary« de John Warden.

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio  
Esperantista, Vcl. 15, n-ro 3/4 (1965)

415.4 : 408.92

### KONTRIBUO AL LOGIKA SCIENCA TERMINARO\*)

(de Maurice Lewin, Britujo)

La Zamenhofa metodo de vortfarado per kunigo de radikoj estis sendube influita per la sistemo ĝenerale uzata en la okcidenta socio. Dum pli ol du jarmiloj sciencaj kaj teknikaj terminoj estis laŭbezone kreaĵoj per la kombino de klasikaj radikoj, kutime de la greka deveno. Dum la mezepoko tiu procedo estis praktikata de klerikoj, sed ĝi nun-troviĝas ĉefe en la manoj de laikoj. Pro la kresko kaj ŝanĝiĝo de la kuranta filozofio, novaj terminoj formiĝis, dum la malnovaj akceptis novajn signifojn. Tiel la terminologio fariĝis interne iom malkonsekvencata (komp. **astrologio** kaj **astronomio**). Tiuj terminoj tamen estas nun en ĝenerale akceptita uzado, kaj eĉ ni Esperantistoj devas ilin uzi laŭeble sensanĝe, krom nur negravaj ĝustigoj de ilia literumado kaj vortfinaĵoj (ekz. **telephone** al **telefono**).

Feliĉe Esperanto permesas alternativan metodon de vortkonstruo per uzo de ekzistantaj radikoj de latina aŭ germana devenoj. Tion ni ofte trovas en la germana lingvo; komparu **Telephone** kun **Fernsprecher**. Tiel povas rezulti du samsignifaj vortoj, (ekz. **fotometro** kaj **lummezurilo**), kvankam konforme al la esperanta regulo pri vortekonomio ni ne devas akcepti ambaŭ, se ilia signifo estus la sama.

La rapida aperado de teknikaj terminaroj urĝas al ni la neceson sistemigi niajn sciencajn terminojn kaj precizigi iliajn signifojn. Ĉar tiu problemo aperas al mi tro vasta kaj komplika por ĝin entrepreni, mi limigas la ĉisuban artikolon al la pritrakto de nur kvar grekaj vortoj uzataj kiel sciencaj sufiksoj, kaj mi tie proponas diversajn modifojn kaj ŝanĝojn for ilin akordigi en logika sistemo.

\*) La redakcio aperigas ĉi tiun artikolon, eĉ sen mallongigo, ĉar ĝi tuŝas tre gravan demandon. Flankenlasante la proponitajn solvojn, la artikolo verŝajne instigos multajn cerbumadi pri la starigita demando.

Tiuj sufiksoj troviĝas ĉe la malsupro de paĝo 59 de mia »Metologia Terminaro«, kaj mi ripetas ĉi-tie la donitajn difinojn.

- 1) — **log** (o) = scienculo, spertulo, esploristo
- 2) — **metr** (o) = mezurilo, aparato kiu provizas numerajn grandojn
- 3) — **graf** (o) = registrilo, aparato kiu provizas grafikaĵon, aŭ personon kiu verkas priskribon de sia branĉo de scienco
- 4) — **skop** (o) = indikilo, montrilo, aparato kiu ebligas observi fenomenojn

Tiuj sufiksoj estas ĝenerale uzataj en la scienca literaturo je la donitaj sencoj, kaj scienculoj — verkistoj samsence uzas ilin por kreado laŭbezone de novaj fakterminoj, ekz. **elektrologo**, **elektrografo**, **elektrometro**, kaj **elektroskopo**.

Ĉiu el tiuj kvar sufiksoj povas esti sekvata per plua sufikso i (o), kaj per la kombino oni kreas novan terminon por la koncerna scienco aŭ studo, ekz. **elektrologio**, **elektrografio**, ktp.

Krome la ŝanĝo de **-grafo** al **-gramo** donas novan terminon kun signifo de skriba rekordaĵo aŭ rekordfolio de la koncerna aparato, ekz. **telegrafo** estas uzata por sendi **telegramon**.

Le regula uzado de tiuj sufiksoj multe konvenas por la sciencoj. Sed bedaŭrinde dum la natura evoluo de la nacilingvoj estis kreitaj multaj difinoj, kiuj malakordas kun la supra skemo; krome, ilia esperanta signifo kelkfoje diferencas de la scienca. Ekzemple, **teologo** ja ne estas spertulo pri teo, kaj **monologo** ne signifas financan spertulon. En la sekventa tabulo mi listigas ĉ. 30 kvaropoj de tiaj terminoj en kiujn enŝteliĝis malakordoj kiuj povas kaŭzi miskomprenojn, aŭ almenaŭ neprecizajn komprenojn. Por tion eviti mi en sekvantaj apartaj paragrafoj pridiskutas aŭ proponas diversajn eliminojn, ŝanĝojn, kaj logikajn esperantradikajn alternativojn. Sendube multaj el miaj proponoj unuavide ŝajnos strangaj, sed mi esperas ke almenaŭ kelkaj ili trovos aprobon de verkistoj.

Por klare indiki la vortojn kiujn mi proponas elimini aŭ anstataŭigi per aliaj, mi presigas ilin en rektaj krampoj. [ ]

Literoj (l. s.) signifas »laŭsence«

**Aerologo**, **io** indikas ke ambaŭ formoj estas uzeblaj, kvankam diverssence.

## LISTO DE RADIKOJ

	—logo	—grafo	—metro	—skopo
1	—logo			
2		—grafo		
3		—gramo		
4	Monologo	Monografio	Monometro	Monoskopo
5	Biologo	Biografio	Biometro	Bioskopo
6	Geclogo	Geografio	Geometro	
7	Planologo	Planografio	Planometro	
8	Aerologo	Aerografio	Aerometro	Aeroskopo
9	Astrologo	Astrografio	Astrometro	Astroskopo
10	Telelogo	Telegrafio	Telemetro	Teleskopo
11	Mikrologo	Mikrografio	Mikrometro	Mikroskopo
12	Meteologo	Meteografio	Meteometro	Meteoskopo
13	Spektrologo	Spektrografio	Spektrometro	Spektroskopo
14	Radiologo	Radiografio	Radiometro	Rakioskopo
15	Termologo	Termografio	Termometro	Termoskopo
16	Barologo	Barografio	Barometro	Baroskopo
17	Fotologo	Fotografio	Fotometro	Fotoskopo
18	Fonologo	Fonografio	Fenometro	Fonoskopo
19	Heliologo	Heliografio	Heliometro	Helioskopo
20	Agrologo			
21	Kalilogo	Kaligrafio		
22	Kinologo	Kinografio		Kinoskopo
23	Ideologo	Idecografio		
24	Demologo	Demografio		
25	Pornologo	Pornografio		Pornoskopo
26	Dialogo	Diagrafo	Diametro	
27	Hronologo	Hronografio	Hronometro	
28	Pantologo	Pantografio		Pantoskopo

## DISKUTOJ

1. —**logo** = scienculo, spertulo, esploristo (origine ĝi signifas »vorto«)

[Monologo]

= solparolo

[Dialogo]

= duparolo, duperpersona konversacio

[Trilogio]

= triparta verko

[Prologo]

= antaŭludo, antaŭparolo

[Epilogo] = postludo, postparolo, finparolo  
 [Analogo] = samsignifo, ekvivalento  
 Grafologo, io = Scienculo pri rekordiloj

**Logo** uzata kiel radiko:

Logografo = maŝino por presi tekston per vortoj, ne per literoj  
 Logogramo = bildeto reprezentanta vorton

2. En la sekvantaj terminoj la sufikso **-grafo** ne signifas rekordantan aparaton, sed fakulon kiu verkas priskribon de sia branĉo de scienco.

Stenografo, io  
 Geografo, io  
 Demografo, io  
 Kaligrafo, io  
 Pornografo, io  
 Mondografo, io = [Gecgrafo, io]  
 Oceanografo, io

3. **-gramo** = rekordaĵo, rekordfolio  
 [Programo] = eventolisto  
 [Diagramo] = grafikaĵo, grafikaro  
 [Epigramo] = sprita diraĵo  
 [Anagramo] = miksliterumo

**Gramo** ankaŭ signifas pezunuon:

Pezogramo = fizika pezunuo  
 Masogramo = fizika masunuo

4. **Mono** — en scienco = ununura, sola; sed ĉar en Esperanto ĝi signifas finanĉan pagilon, estas konsilinde ĝin tute elimini kiel scienca terminon

[Monologo] = solparolo  
 [Monogramo] = literplekŝaĵo  
 [Monografio] = soltema disertacio  
 [Monoskopo] = Metrolonga mezurilo (Angle: Yardstick)  
 [Monometro] = unuokulara tele-aŭ mikroskopo

5. **Bio** — = vivo  
 Biologo, io = (l. s.)  
 Biografo = rekordilo de vivfenomenoj, ekz. kardiografo  
 [Biografio] = vivckuro, rakonto de personaj travivaĵoj  
 Biogramo = rekordfolio de biografo  
 Biometro = mezurilo de vivfenomenoj, ekz. encefalometro  
 Bioskopo = [kinemografo] = obsrevilo de vivfenomenoj ekz. stetoskopo

6. **Geo** — = terkrusto, terkrusta tavolaro  
 Geologo, io = (l. s.)  
 [Geodezio] = topometrio, mezurado de vastaj tersurfacoj

Topografio = priskribo de tersurfaco  
 Mondo = homaro kaj siaj vivcirkonstancoj  
 [Geografo, io] = Mondografo, io  
 Geometro = mezurilo de dikeco de terkrustaj tavoloj, ekz. per eĥosonilo

[Geometrio] = planometrio + stereometrio  
 Metrologio = planometrio + stereometrio + trigonometrio

7. **Plano** — = ebena  
 Planometrio = [surfaca aŭ ebena geometrio]  
 = scienco pri ebenaj figuraĵoj  
 Planografio =  
 Planometro = mezurilo de areoj de ebenaj surfacoj

8. **Aero** — = atmosfero  
 Aerologo, io = (l. s.)  
 Aerografo, io = sendilo de mesaĝoj per radio  
 [Aerografo] = metecgrafo = registrilo de kelkaj meteo  
 Aerogramo = perradia mesaĝo  
 Aerometro = mezurilo de aera pezo kaj denso  
 Aeroskopo = observilo de aeraj fenomenoj

9. **Astro** — = ĉiela korpo (stelo, planedo, galaksio)  
 Astrologo, io = [Astronomo, io] = scienculo kiu studas ĉielajn korpojn  
 [Astrologo] = sortodivenisto  
 Astrografo = fotilo de ĉielpartoj  
 Astrometro = mezurilo de lumpotenco de astroj  
 Astroskopo = [teleskopo] = observilo de astroj

10. **Tele** — = distanco  
 Telelogo, io = (l. s.)  
 Telegrafo, io, = sendilo de mesaĝoj tra dratoj  
 Telegramo = telegrafia mesaĝo  
 Telemetro = ilo por mezuri distancon de objekto  
 Teleskopo = lorno = televidilo por pejzaĝo  
 Televizio = perradia televida sistemo  
 Telegrafisto = telegrafia fakulo

11. **Mikro** — = eta, nevidebla per normala okulvido  
 Mikrologo, io = (l. s.)  
 Mikrografo, io = skribilo de etaj literoj aŭ desegnaĵoj  
 Mikrogramo = rekordfolio de mikrografo  
 Mikrometro = mezurilo por mallongeco aŭ maldikeco  
 Mikroskopo, io = (l. s.)  
**Mikro** — ankaŭ signifas miliononon, tial:  
 Mikrometro = mezurunuo de  $10^{-6}$  metro  
 Mikrogramo = pezunuo de  $10^{-6}$  gramo

12. **Meteo** — = klimata aŭ vetera fenomeno  
 Mcteologo, io = (l. s.)  
 Meteografo, io = (l. s.)  
 Meteogramo = desegnaĵo pri evoluo de iu meteo ĉe stacio  
 (Me'eoro = aerolito, bolido, astrojdo)

13. **Spektro** = bildo de difrakta lumfaŝko  
 Spektrologo, io = (l. s.)  
 Spektrografo, io = fotobildigilo de spektroj  
 Spektrogramo = multkolora bildo de spektro  
 Spektroskopo = observilo por spektra analizo
14. **Radio** — = elektromagneta ondpropago  
 Radiologo, io = (l. s.)  
 Radiografo, io = sendilo de mesaĝoj per radio  
 Radiogramo = [gramofona muzikilo] = perradia mesaĝo  
 Radiometro = mezurilo de ondolongeco kaj radiopotenco  
 Radioskopo = radara observilo
15. **Termo** = varmo, temperaturo, kaloro  
 Termologo, io = (l. s.)  
 Termografo = rekordilo de temperaturo  
 Termogramo = rekordfolio de termografo  
 Termometro = mezurilo de temperaturo  
 Termoskopo = montrilo de temperaturvarioj  
 Kalorometro = mezurilo de varmoenergio
16. **Baro** = atmosfera premo  
 Barologo, io = (l. s.)  
 Barografo, io = (l. s.)  
 Barogramo = (l. s.)  
 Barometro = hidrarga mezurilo de aerpremo  
 Baroskopo = anerojda montrilo de aerpremo  
 Manometro = mezurilo de interna premo en gaso aŭ likvo
17. **Foto** = lumbildo  
 Fotologo, io = (l. s.)  
 Fotografo, io = kamero, fotilo  
 Fotogramo = foto  
 Fotografisto = fakulo pri kameroj  
 Fotisto = [fotografisto] = fakulo pri fotobildigo  
 Fotometro = mezurilo de lumpotenco  
 Fotoskopo = ilo por ekzameni fotojn aŭ lumbildojn
18. **Fono** = produktita sono  
 Fonologo, io = (l. s.)  
 Fonografo, io = [muzika aŭdigilo] = rekordilo de sono al disko aŭ magneta bendo  
 Fonogramo = sonprodukta disko aŭ bendo  
 [Gramofono] = fonilo  
 Fonometro = mezurilo de sonforto  
 Fonoskopo = aparato por videbligi sonon
19. **Helio** = suna disradiado  
 Heliologo, io = (l. s.)  
 Heliografio = signaligo per reflektaj sunradioj  
 Heliografo = sunografo, registrilo de ĉiutaga sunhela daŭro

- Heliogramo = rekordfolio de sunografo  
 Heliometro = mezurilo de potenco de sunradioj  
 Helioskopo = sendanĝera observilo de suno (ekz. tra multkolora vitraĵo)
20. **Agro** = kultivebla kampo  
 Agrologo, io = [agronomo] = Sc. pri grundkultivo  
 Agrokultivo = [Agrokulturo] = [agronomio]  
 Agrokultivisto = [agrikultura fakulo]  
 (kulturo signifas civilizacion)
21. **Kali** = belskribo  
 Kalilogo, io = (l. s.)  
 Kaligrafo, io = belskribisto  
 Kaligramo = belskribita dokumento aŭ specimeno
22. **Kino** = rapido de movo  
 Kinologo, io = (l. s.)  
 Kinografo = produktilo de kinofilmoj  
 Kinogramo = kinofilmoj, kinobendoj  
 Kinoskopo = projektilo de filmoj
23. **Ideo** = pensaĵo  
 Ideologo = filozofo  
 Ideografo = signa prezento de ideo  
 Idecgramo = bildeto esprimanta vorton
24. **Demo** = popolo  
 Demologo, io = (l. s.)  
 Demografio = priskribo de popola vivo  
 Demografo = studanto de popola vivo
25. **Porno** = nedeca  
 Pornologio = [pornografio] = (l. s.)  
 Pornografio = Priskribo de nedecaĵoj  
 Pornogramo = Nedeca bildo  
 Pornoskopo = Montrilo de nedecaj bildetoj
26. **Dia** = trans  
 [Dialogo] = duparolo, dupersona konversacio  
 [Diagrafo] = rekordilo de projekcioj  
 [Diagramo] = grafikaĵo, grafikaro  
 Diametro = transcirkla larĝo = [ne mezurilo]
27. **Hrono** = tempo  
 Hronologio = tempa difino de historiaj eventoj  
 Hronografo = registrilo de pafdaŭro  
 Hronoskopo = observilo por precizigi pafdaŭron aŭ pafrapidon  
 Hronogramo = frazo kies literoj havas numeran signifon  
 Hronometro = preciza horloĝo, ĉe maristoj

- 28. **Panto** = universala
- Pantologo, io** = sciencologo, scienculo pri la universala sciencaro
- Pantografo** = reduktilo aŭ grandigilo de bildoj
- Pantogramo** = (l. s.)
- Pantoskopo** = largevida fotolenso

En la finremarko mi volas reemfazi ke mi elektis en tiu-ĉi artikolo trakti nur sciencajn terminojn, kiuj posthavas la sufiksojn **-logo**, **»grafo**, **-metro**, **-skopo**. Carte ekzistas pluj branĉoj de terminologio, kiuj povus esti simile pritraktotaj. Eble iu kompetentulo entreprenos la pluan sistemigon de tiu problemo.

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio  
Esperantista, Vol. 15, n-ro 3/4 (1965)

347.933 + 937 (497.2)

**PROBLEMOJ DE LA ESTINGANTA PRESKRIPTO<sup>1)</sup>**  
**EN RILATO AL LA BULGARA CIVILA JURO**

(de Ljubomir Mihajlov, Bulgario)

I

Laŭ § 118 de la bulgara Leĝo de la debitoraĵoj kaj kontraktoj »se la debitoro plenumas sian debitoraĵon malgraŭ ke ĝi estas estingita per la estingata preskripto, li ne havas rajton postuli reen la pagi-taĵon...«. Laŭ § 32 al. II de la sama Leĝo »la juĝplendato, kontraŭ kiu oni postulas plenumon de nuligebla kontrakto, povas postuli per ekscpecio la nuligon de la kontrakto, malgraŭ ke lia rajto estas estingita per la estinganta preskripto«.

El tiuj ĉi tekstoj kaj aliaj similaj la bulgaraj juristoj konkludas, ke la estinganta preskripto ne estingas la tuŝitan rajton.

Tiu ĉi kokludo starigas la demandon: Se la estinganta preskripto ne estingas la rajton, tiam kia estas la funkcio de tiu ĉi preskripto? Kion estingas la estinganta preskripto?

La respondo de tiu ĉi demando postulas klarigon de kelkaj demandoj koncerne la realigon kaj la ekzercadon de la rajtoj<sup>2)</sup>.

II

La rajtoj realiĝas diversmaniere: per ago de la aktiva partio (la titolulo de la rajto), per ago de la pasiva partio kaj fine per ago de la organoj, ŝarĝitaj realigi la rajtojn.

La maniero de la realigo de la rajtoj dependas unuflanke de la karaktero de la rajto kaj aliflanke — de la volo de la partioj.

La sekvontaj ekzemploj, prenitaj el la funkcia bulgara civiljuro, povas illustri la menciitan diversmanierecon de la realigo de la rajtoj.

1) extinctive prescription (A), prescription extinctive (F), Verjährung (G), prescrizione (I), iskovaja davnost (R).

2) ekzerco de la rajto — ago de la titolulo de la rajto, direktinta al realigo de la rajto.